Numero tria. Lundon 8-an de aŭgusto

# Kongresa Sciulo

Kongresa Kuriero de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto




**Grupa foto de la kongresanoj, 7-an de aŭgusto 2022, Montrealo**

## Lundo dum UK = Kleriga lundo!

Jen la skemo kaj priskribo de unuopaj programeroj por la **Kleriga lundo**. Nepre vizitu almenaŭ kelkajn el ili, la temoj abundas, la prelegantoj elstaras!

**Lapenna** 09:00-10:30
Renée Triolle: Victor Lebrun, modesta pensanto, sekretario de Tolstoj
Victor Lebrun estas la unua pagita sekretario de Lev Tolstoj, li devis lerni Esperanton por respondi la leterojn . Filo de internacia paro, li memlernis en Rusio, ĝis li fine instaliĝis en suda Francio, kie li anticipas ĉiujn nunajn pensmovadojn : vegetarano, defendanto de virina libereco, liberpensado, ktp.

**Lapenna** 10:45-12:15
Humphrey Tonkin: Multlingvismo kaj UN: kiu strategio por Esperanto?
Oni ne havu iluziojn pri la lingvopolitiko de Unuiĝintaj Nacioj: la nuna seslingva politiko de la Ĝenerala Asembleo kaj la nuna dulingva politiko de la Sekretariato ne estis starigitaj pro la amo al multlingvismo en UN sed pro kruda politika neceso. Tra la jaroj, tiu politiko enbakis en la organizon investitajn interesojn kiujn oni tre malfacile kontraŭstaras. La unua stadio por ŝanĝi tion estas konvinki la organizon kaj ties membrajn ŝtatojn, ke multlingvismo estas pozitiva politiko en si mem kaj ke la nuna sistemo estas maljusta. Nur post tio, oni povos efike proponi Esperanton kiel pontolingvon.
Ĉu tiu strategio, nun sekvata de la reprezentantoj de UEA, estas ĝusta? Kiel apliki ĝin efike?

Sekvo en paĝo 3

## Maskoj senpagaj kaj forĵetotaj



KOVIM-19 ankoraŭ vivas kaj maskoj plu estas utilaj. Vi trovos ĉe la diversaj enirejoj de la kongresejo senpagajn maskojn kaj lokojn por ĵeti uzitajn maskojn — ilia plasto estos reciklota. Vi ankaŭ trovis, ie ĉie, alkoholan manpurigilon.




## Indiĝena Kinejo dum la Internacia Tago de Indiĝenaj Lingvoj!

**Indiĝenaj filmoj en Esperanto: filmoj de Nacia Film-Oficejo**. Kelkaj elstaraj filmoj de indiĝenaj filmfaristoj, produktitaj de Nacia Film-Oficejo de Kanado: *Spiroj, Revivigi la Nakotan Lingvon, Tri Mil*. *Beauchemin,* 13:30-14:00.

**Indiĝenaj filmoj en Esperanto: Wapikoni Mobile.** Ĉiujare ĉ. 300 indiĝenaj gejunuloj partoprenas en atelieroj kaj kreas plurajn dekojn da mallongaj filmoj kaj muzikaj verkoj, kadre de la Wapikoni Mobile – neprofitcela organizo bazita en Montrealo. Wapikoni Mobile vizitis ĉirkaŭ 30 naciojn en Kanado kaj ankaŭ ekster Kanado kaj produktis pli ol 1000 mallongaj filmoj kaj pli ol 600 muzikaĵoj, donante parolon al pli ol 4 mil indiĝenaj gejunuloj. La LKK partneriĝis kun Wapikoni Mobile por montri al kongresanoj kolekton de 16 filmoj el 7 diversaj nacioj. *Solis,* 16:45-18:00.

## KER-ekzamenoj

**Lundon, je la 21a horo, estas la lasta momento por aliĝi al la KER-ekzamenoj.**
Aliĝilo: https://edukado.net/ekzamenoj/ker/uk
Prepar-seminario: **KLERIGA LUNDO,** je la 10h45 en al salono *Nourmont*.
Detalaj informoj: Kongresa libro, paĝoj 50-51 aŭ ĉe Katalin Kováts, KN 500.

*Kongresa Sciulo* estas la kongresa kuriero de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto, en Montrealo, Kebekio, Kanado, de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto de 2022. Redaktas Sylvain Auclair. Redaktejo: ĉambro Milojević, Université du Québec à Montréal, DS-R340. Nova numero aperas ĉiumatene (krom en merkredo). Eblas elŝuti koloran version per apo trovebla je uk2022.glideapp.io. Kontribuojn (tekstojn kaj fotojn) sendu al jrsylvain.auclair (ĉe) gmail.com.

© Universala Esperanto-Asocio, 2022.

Dépots légaux: Bibliothèque nationale du Québec et Bibliothèque nationale du Canada, troisième trimestre, 2022.

## Reciklado

En Kanado, oni pli kaj pli reciklas la paperan, metalan kaj plastan rubaĵojn. Eĉ manĝorubaĵojn oni pli kaj pli ofte kompoŝtigas. Ankaŭ en la kongresejo ekzistas ujoj en kiujn deponi tiajn rubaĵojn (sed ne la kompoŝtigeblajn — kaj ankaŭ deploni ne recikleblajn rubaĵojn. Jen ekzemplo de tiaj ujoj.



**Kleriga lundo…**

**Lapenna** 12:30-14:00
Thomas Bormann: Irako ĉu kolapsanta ŝtato?
Multaj ŝtatoj en Meza Oriento kaj Norda Afriko dronas en senfinaj krizoj: milito en Sirio depost 11 jaroj, ankaŭ en Libio konfliktoj daŭras, Libano suferas ekonomian disfalon neniam antaŭe spertitan kaj Irako ne retrovis pacon dum la pasintaj jardekoj. Dum la Kleriga Lundo ni analizos la situacion en Irako: la 40 milionoj da enloĝantoj estas dividitaj en etnaj kaj religiaj frakcioj: kurdoj, anoj de sunaismo, anoj de ŝijaismo - iu *iraka identeco* apenaŭ ekzistas. Konfliktoj inter tiuj frakcioj akriĝis dum kaj post la jaro 2003, kiam trupoj el Usono kaj aliaj okcidentaj landoj invadis Irakon. Tiuj konfliktoj paralizas la landon ĝis hodiaŭ.
Ĉu Irako havas estonton?

**Nourmont** 10:45-12:15
Katalin Kováts: Preparseminario por la KER-ekzamenoj
En 2022 UEA relanĉis sian KER-ekzamenan sistemon, kaj en la nova formo aldoniĝis la plej alta nivelo: C2. En junio okazis retaj ekzamenoj je niveloj B1, B2 kaj C1, kiujn partoprenis 83 personoj el 30 landoj.
Kiel tradicie dum la kongreso okazos ĉeestaj ekzamenoj kaj debutos ankaŭ la C2-nivelo.
La KER-seminario celas la jam aliĝintojn kaj tiujn, kiuj volas en Montrealo trapasi ekzamenon aŭ interesiĝas pri la eblo por estonta dato. En la programo oni ricevos informojn pri la strukturo de la ekzamenoj kaj utilajn konsilojn por sukcese trapasi la sesiojn. La partoprenantoj solvos modeltaskojn kaj povos sperti ekzamenajn situaciojn.

**Nourmont** 12:30-14:00
Raymond Brisebois: La homaranismo de d-ro Zamenhof
Pli precize la prezento temos pri *Homaranismo — ankoraŭ inspiraj pensoj el la verkaro de L.L. Zamenhof* per kio mi prezentas historion de la 1917-a e*kzempla teksto de Deklaracio pri Homaranismo* kaj komentarion de la dek principoj de tiu deklaracio.

**Solis** 09:00-10:30
Kristin Tytgat: Kial ni ploras? Interkulturaj
La homo estas la nura animala speco en la naturo kiu ploras pro emociaj kialoj. Kio estas la funkcio de plorado por ploranta homo mem kaj kio estas la efiko por la aliaj homoj? Plorado ne estas nur fenomeno de individua ago. Ankaŭ la socio en kiu ni vivas kreas la kondiĉojn por plorado. Ni uzas niajn larmojn depende de la kulturaj normoj kaj valoroj en la socio. Ĉu ekzemple ĉefe virinoj ploras aŭ ĉu ankaŭ viroj rajtas plori? Ni provos klarigi multajn aspektojn de plorado pere de konkretaj situacioj. Sendube vi povos kontribui el via propra vivosperto. Venu malkovri kaj diskuti tiun apartan specon de komunikado. Kaj ne timu: ankaŭ ridi dum la sesio estos permesata!

**Solis** 10:45-12:15
Javier Alcalde: Kiel fari esploradon pri Esperanto-historio
Pro pluraj kialoj, plej ofte la esploradon pri la historio de la Esperanto-movado faras la esperantistoj mem, kiuj ne nepre havas prihistorian trejnadon. En tiu programero ni kune pripensos la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de tiu situacio.
Pere de konkretaj ekzemploj, oni donos konsilojn pri teknikoj kaj rimedoj disponeblaj, kaj oni klopodos kune respondi demandojn kiel la jenajn: Kie trovi fontojn? Ĉu oni devas viziti arĥivojn? Ĉu dokumentoj ĉiam fidindas? Ĉu intervjuoj gravas? Kiujn indas intervjui? Ĉu troveblas mono por fari tiajn esplorojn? Kvankam la pritraktotaj ekzemploj rilatos specife al Esperanto, finfine multaj el la ideoj aplikeblos ĝenerale al iu ajn temo de (socia) historio.

**Solis** 12:30-14:00
Jimmy Stryhn Meyer: La kanada viskio
Ĉu necesas klarigoj? La preleganto spertas pri diversnaciaj trinkaĵoj kaj ĉifoje li prezentos detale tipe kanadan viskion.

**Saint Martin** 09:00-10:30
Sylvain Lelarge: Renkontiĝo kun bestoj
Nia mondo plenas je bestoj: grandaj aŭ malgrandaj, amikaj aŭ malamikaj, kompaniaj aŭ sovaĝaj, ĉiutagaj aŭ ekzotikaj. Ŝatbestoj kiel karaj amikoj kun sentoj, uzbestoj kiel (manĝ)aĵoj senanimaj. Niaj infanrakontoj kaj infanĉambroj plenplenas je ili, sed (feliĉe) kiu infano iam troviĝis naz-al-nazo kun vera lupo? Bestoj generas ĉe ni tenerecon, timon, fierecon, scivolemon. Sed, malgraŭ ilia oftega ĉeesto en niaj kulturaj mondoj, ni, homoj, fakte ofte ne konas, ne komprenas ilian mondon kaj sekve ni vole-nevole mistraktas ilin kaj detruas iliajn vivmediojn. Dum la seminario la partoprenantoj spertos diversajn laborformojn, promenante tra nia (interna) bestĝardeno.

# Ŝanĝoj al la programo

**Jen la nova priskribo de la programero de Tony Harris (antaŭe James Hopkins):**

Ĉiuj scias ke oni povas krei lingvon, ĉar ni parolas tian. Kaj kelkaj popularaj filmoj kaj televidserioj ankaŭ uzas artefaritajn lingvojn pro riĉigi kaj kompletigi la fantaziajn mondojn pri kiuj ili rakontas. Sed ankaŭ ekzistas lingvokreantoj kiuj praktikas sian arton pro simpla amo de la kreado de lingvoj, aŭ pro profunda persona konekto al la lingvo kaj kulturo kiujn ili kreas. En ĉi tiu prelego ni esploros iom de tiu komunumo kaj la arto de krei lingvon kaj mondon.

Tony Harris estas dumviva lingvokreanto de la alurhsa lingvo kaj kelkaj aliaj, bibliotekisto de la Lingvo-Kreado Socio. Li Esperantiĝis en 1977. Li loĝas en la usona ŝtato Vermonto kun sia edzino kaj katoj, kaj laboras en informatiko por la vermonta ŝtatuniversitata sistemo.

**Kiam**: 16:45 - 17:45. Kie: *Lapenna*

/Tony Harris

**Renkontiĝo kun bestoj** (kleriga lundo) okazos NE en Salono NOURMONT (kiel indikite en la programo) sed en **Salono SAINT-MARTIN**, je la unua etaĝo. Estas loko por 30 personoj. Komenciĝos kiel indikite je la 9a.

## Ŭonbulismo kaj meditado

Lunde, en la 8a de aŭgusto, je 16:00-16:45, en la salono *Beauchemin* okazos la fakkunsido de la Esperantista Asocio de Ŭonbulimo. Tio estos nia deksesafoja kunsido en la Universala Kongreso de Esperanto.
Ni prezentos la religion ŭonbulismo, kiu estis kreita en Koreio antaŭ 107 jaroj, kaj kune praktikos meditadon, kvankam mallonge. Ni informos vin pri la Internacia Meditado, kiun ni organizos ĉi-aŭtune tuj antaŭ la 10a Azia-Oceania Kongreso en Busano, Koreio. Bonvenon al la kunsido!

**Aŭtora duonhoro: Tonkin.**
Pri: Sarra - la parta traduko de la *Gastlibro* kaj la pli-malpli forvaporiĝinta *Memoru ĉi praulojn*.
Salono *Saint-Martin*, lundo 17:15 - 17:45

# Tago de Lernado, 9-a de aŭgusto 2022

**Temo:** ***Instruado de Esperanto laŭ diversaj lingvoj, kulturoj kaj regionoj***

**Subtemo:** ***Pandemiaj spertoj kaj postpandemiaj tendencoj en instruado***

09.00-09.10: Salutoj

09.10-10.00: Zdravka Metz (Kanado): Eduka sistemo en Kebekio

10.00-11.00: Duncan Charters (Usono): Ĝenerala enkonduko al la temo - Interkultura Kompetento; Kiel plani por la estonta instruado de Esperanto al pli vasta lernantaro

11.00-11.30: Katalin Kováts (Nederlando/Hungario): KER-Ekzamenoj tutmonde, ĉu ankaŭ ĉe vi?

11.30-12.00: Orlando Raola (Usono): Transformado de "Eternaj Komencantoj" al "Maturaj Ellernintoj" aŭ "Tra densa mallumo briletas la celo"

12.00-12.45:

- Duncan Charters (Usono): Pli efika lingvoinstruado dum la pandemio: ideoj kaj miaj spertoj instruante la hispanan virtuale en la propraj klasoj
- Karina Oliveira (Brazilo/Koreio): Miaj spertoj en la unua ĉeesta NASK dum la pandemia epoko

12.45-13.15: Kristin Tytgat (Belgio): Dulingvaj lernejoj en Bruselo

13.15-13.45: Maritza Gutierrez (Kubo): Radio kiel didaktila ilo: spertoj pri alfabetigo per kuba lernometodo en Haitio

13.45-14.00: Fermo



**Hodiaŭ:** 21°, pluvo kaj fulmotondroj

**Vespere:** 18°, pluvo

**Nokte:** 16°, pluvo

**Morgaŭ matene:** 19°, nuboj